INFORM@DIKO

Vikipedio

Daniele Binaghi

Vikipedio (esperantigo de la angla vorto *Wikipedia*, kunfando de la havaja vorto '*wiki*' = rapide kaj de la angla '*encyclop(a)edia*' = enciklopedio) estas interreta, plurlingva enciklopedio kun enhavo laŭ la koncepto de libera scio. Ĝin verkadas volontuloj kunlabore – ĉiu homo kun aliro al la interreto rajtas ŝanĝi la enhavon de preskaŭ ĉiu artikolo. Tamen oni ne rajtas fari ion ajn, sed oni devas obei iujn regulojn. La plej gravaj estas *konformeco* al enciklopedieco, *neŭtraleco* kaj *respekto*.
La projekto komenciĝis je la 15-a de januaro 2001, kaj nun ĝi estas administrita de la senprofitcela Fondaĵo Vikimedio. Vikipedio ekzistas en pli ol 260 lingvo-versioj. La Esperanta versio enhavas nun pli ol 107000 artikolojn, kaj la itala jam 516000. De sia fondiĝo Vikipedio daŭre pli populariĝis, kaj ĝia sukceso instigis fondon de pluraj frataj projektoj.
Dum la lastaj tagoj, artikolo pri Esperanto eniris la montrofenestron de la itala vikipedio. Tio estis vere granda sukceso, laŭ la vortoj de unu el la kunlaborantoj, Francesco Costanzo: “aperigi artikolon en la montrofenestro signifas verki eron kiu respektas la regulajn indikojn de Vikipedio kaj kiu estos juĝita de aliaj uzantoj; ĝuste pro tio ĝi devas havi enciklopedian stilon, esti kiel eble plej multe neŭtrala, kaj referenci al fontoj kiuj certigas ke tio kio estas skribita ne estas invento de la aŭtoro; krom tio, kompreneble, la enhavo devas estis interesa por la leganto. Dum ĝi estos en la montrofenestro, la artikolo aperos en la ĉefpaĝo de *Wikipedia* (rotacie kun aliaj artikoloj)”. Kaj tio estos kompreneble bonega reklamo por Esperanto.
Sed ĉu estas tiel facile produkti bonan artikolon? Pri la reguloj Francesco jam diris. Sed kelkfoje oni forgesas ilin, dum entuziasmaj sesioj de kontribuado, kaj poste naskiĝas problemoj, kiel dum ĉi-jara somero; rakontas Fabio Bettani, estrarano IEJ kaj ties respondeculo por *Wikipedia*: "dum tiu periodo, kreiĝis konstanta grupo da kontribuantoj, kiuj komencis produkti multajn erojn por vikipedio; tamen, post iom da tempo, aperis ankaŭ duboj pri enciklopedieco de tiuj eroj, precipe de tiuj rilatantaj la lokajn grupojn. Tio, kio devus aperi en tiaj artikoloj estas, ekzemple, historiaj detalaj



La ĉefa paĝo de la itala Vikipedio, kun artikolo pri Esperanto

informoj, laŭeble konfirmitaj de ekstermovadaj liberaj kaj enciklopediaj fontoj, raportoj pri agadoj kiuj koneksigis la grupon kun la loka kultura vivo, kaj fotoj de eventoj kiuj atingis larĝan eĥon ĉe la amaskomunikiloj kaj la publiko; kontraŭe, ni havis malmultajn kaj malprecizajn historiajn informojn, ofte senfontajn, raportojn pri malgrandegaj eventoj kiuj tute ne estis konataj ekster la movado, kaj fotojn kiuj ege plaĉis al la ĉeestantoj sed neniam aperis ĉe iu ajn amaskomunikilo. De tie, recenzistoj iris ankaŭ al aliaj artikoloj, kiel tiuj pri la naciaj renkontiĝoj (IJF kaj Itala Kongreso, ekzemple), kaj ankaŭ tie evidentiĝis ke informoj ne estis prezentitaj sufiĉe bone por montri sian enciklopediecon. Okazis voĉdonadoj, dum kiuj longtempaj kontribuantoj al Vikipedio rajtas decidi ĉu forigi aŭ ne artikolojn, kaj bonŝance ni kapablis savi multajn el ili, sed necesis granda laboro".

Ĉio ĉi kompreneble ne estas invito por ne plu kontribui al Vikipedio; Male! Sufiĉus ke "la lokaj grupoj kreu siajn proprajn artikolojn en Vikipedio, kolektante sufiĉe grandan kvanton da informoj antaŭ ol verki la artikolon. Kaj fotoj estas ankaŭ akceptitaj, kondiĉe ke la aŭtoroj mem enmetu ilin en la retejon aŭ ke ili donu sian rajtigon por publika uzado". Kiel dirite, jam ekzistis bonegaj artikoloj: "Kvalito de ili estas sufiĉe bona", diras Francesco; "ekzemple, ekzistas altkvalitaj raportoj pri rilatoj inter Esperanto kaj EU, aŭ la Eklezio, aŭ artikoloj kiuj estis tradukitaj el aliaj lingvoj (vidu en la ĉe-fina kadro por kelkaj sugestoj). Certe, kelkaj artikoloj estis forigitaj, sed laŭ mi kelkfoje estis iom tro da zorgemo dum la elekta fazo". Sed multaj aliaj estas plibonigeblaj, kaj tio estas bona maniero por komenci: ĉiu ajn, laŭ siaj konoj kaj interesoj, povus kontroli la artikolojn kaj, eventuale,

Jen la redaktilo por ŝanĝi la enhavon de artikolo

aldoni aŭ korekti ion. Alia granda kontribua kampo estas tiu de artikoloj pri historio de esperantismo, kaj pri pioniroj kaj ĉefroluloj de la esperantista movado en la pasinteco: ĉiuj, kiuj posedas fidindajn fontojn pri tio povus aldoni utilegajn informojn kune kun la oportuna bibliografia citaĵo. La vikipedia sistemo permesas facile aldoni tekston, kaj ĉiu ajn, kiu legos ĝin, povos samfacile korekti ĝin; ĉiuj ŝanĝoj estos konservitaj, do eĉ se iu eraro okazas oni simple povas reveni al la antaŭa versio. Jen kelkaj konsiloj:

• artikolo havu minimume tri kompletajn frazojn, du ligilojn al aliaj artikoloj, unu kategorion, unu intervikian ligilon (se eble);
• la unua frazo ĉiam estu kompleta frazo kaj enhavu la plej esenca(j)n informo(j)n por enkonduki en la temon;
• transpreno de informoj el fremdaj tekstoj okazu aŭ kiel citaĵo kun fontindiko aŭ en redono per propraj vortoj
• laŭeble, artikolo enhavu almenaŭ unu bildon, piednoton kun fontindiko, verkon sub "Literaturo" kaj eksteran ligilon.

Tamen, por ke la malkutimo uzi teknologion ne estu malhelpo, Fabio (kontaktebla ĉe fabio.bettani@esperanto.it) pretas helpi por la publikigo de materialo, kondiĉe ke ĝi estu jam verkita en enciklopedia formo kaj ke la aldonaj fotoj havu priskribojn kaj la nepran indikon "mi jam parolis kun la aŭtoro de la foto, kaj li pretas doni ĝin por publika uzo".

Kelkaj vortoj, fine, pri la esperantlingva vikipedio: tie, ĉiuj eroj estas utilaj, eĉ tiuj pri geografio aŭ personaj interesoj kaj fakoj (astronomo povus kontribui pri steloj kaj planedoj, beletra instruisto povus skribi pri italliteraturaj roluloj, ktp). "Vikipedio estas grava ponto inter la esperantista komunumo kaj la ekstera mondo", diras Fabio; "ĝi estas la plej granda libro verkita tute en Esperanto, libere legebla de kiu ajn, kaj do estas nia intereso igi ĝin pli bela, pli ampleksa, pli fidinda, pli kolora kaj riĉa je fotoj. Kiel komenci? Tutsimple: kontrolu, ke la artikolo pri via loĝloko diru ion pli ol «XXX estas komunumo en Italio», kaj vi tuj malkovros novan mondon!"

Vikipedio

Ĉefaj ligiloj:
http://it.wikipedia.org (enirejo de la itallingva vikipedio)
http://it.wikipedia.org/wiki/Progetto:Esperanto (Projekto Esperanto: ejo por kunigo de laboroj rilate al la temo Esperanto)
http://it.wikipedia.org/wiki/Portale:Esperanto (Portale Esperanto: montrofenestro pri Esperanto)
http://eo.wikipedia.org (enirejo de la esperantlingva vikipedio)
Artikoloj vizitindaj (ankaŭ uzeblaj kiel modeloj):
http://it.wikipedia.org/wiki/Storia_dell%27esperanto
http://it.wikipedia.org/wiki/Esperanto_ed_Unione_Europea
http://it.wikipedia.org/wiki/Esperanto_e_Chiesa_cattolica
http://it.wikipedia.org/wiki/Esperanto_e_Organizzazione_delle_Nazioni_Unite
http://it.wikipedia.org/wiki/Film_in_esperanto
http://it.wikipedia.org/wiki/Movimento_esperantista_in_Italia

Homaj rajtoj: 60-jaraj
Lingvaj rajtoj: 0-jaraj

Renato Corsetti

Estas malfacile kompreni nun, kion praktikan havis en la kapo la subskribantoj de la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj en San Francisko la 26-an de junio 1945 kiam ili subskribis ĉarton, kiu en sia unua artikolo antaŭvidas:
La celoj de Unuiĝintaj Nacioj estas:
[...]
3. Realigi internacian kunlaboradon por solvi internaciajn problemojn de ekonomia, socia, kultura aŭ humaneca karaktero kaj antaŭenigi kaj stimuli la respekton al homaj rajtoj kaj al fundamentaj liberecoj por ĉiuj sen distingo de raso, sekso, lingvo aŭ religio;
Malgraŭ la monto da libroj kaj studoj pri la Ĉarto de UN, mi kredas ke la simpla respondo devus esti: "nenion". Verŝajne la unuaj subskribantoj kaj la postaj subskribantoj simple konsideris tiun mencion "por ĉiuj sen distingo de raso, sekso, lingvo aŭ religio" simpla stila aldonaĵo, kiu bele sidas en tiu punkto de la teksto, sed kiu devigas al nenio praktika almenaŭ en la tuj posta tempo.
Ĉiuokaze la 10-an de decembro 1948-a la Ĝenerala Asembleo de UN akceptis la konatan Universalan Deklaracion de Homaj Rajtoj, kiu precizigas, kiuj estas tiuj rajtoj.
Se ni rigardas nur al unu el la artikoloj, la artikolo 25-a, ĉiu povas tuj kompreni, kiel la registaroj rilatas al tiu Deklaracio.
Artikolo 25-a. (1) Ĉiu havas rajton je vivnivelo adekvata por la sano kaj bonfarto de si mem kaj de sia familio, inkluzive de nutraĵo, vestaĵo, loĝejo kaj medicina prizorgo kaj necesaj sociaj servoj, kaj la rajton je sekureco en okazo de senlaboreco, malsano, malkapablo, vidvineco, maljuneco aŭ alia perdo de la vivrimedoj pro cirkonstancoj ekster sia povo.
Kompreneble la fakta enhavo de tiuj rajtoj estis daŭre "interpretata" de la unuopa registaro, kaj la grado de ĝuo de la unuopaj rajtoj variis de lando al lando. La ĉi-supra artikolo 25-a, ekzemple, neniam estis aplikita en Usono, kiu ĝenerale estas tre parolema pri respekto de homaj rajtoj fare de aliaj ŝtatoj. Kaj verŝajne ne povis okazi alimaniere, ĉar oni ne

Ni publikigas ĉi tiun artikolon, lige kun la kunveno organizita de Itala Esperanto-Federacio kaj okazinta la 25-an de novembro 2008 en Florenco, kaj en la 60-a datreveno de la aprobo de la Ĉarto de Homaj Rajtoj fare de UNO.